



**Konfliktas kredoĵoj,
mortas miloj**

Katolikaj skandaloj

Egunkaria libroro

Maljusta justico

s honestaj kaj ka-
plej fortaj gar-
Pro tio ili estas
ataj homoj sur nia
aroj ne povas to-

Germanio inter la
ĵurnalisto devis
, sed tute aparte
e Hitler.

a degeneriĝo Kurt
elokventan voĉon
fuzis fuĝi, ĉar li
vas agi kvazaŭ ĉio

Trevor Steele
Kvazaŭ ĉio
dependus de mi

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi

“Aŭtoro je vere monda nivelo”

Gerrit Berveling

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi



FEL

Ĵurnalistoj, se ili estas honestaj kaj kapablaj, estas inter la plej fortaj gardantoj de demokratio. Pro tio ili estas inter la plej endanĝerigataj homoj sur nia planedo: koruptaj registaroj ne povas toleri oponantojn.

En la tumulto epoko de Germanio inter la du mondmilitoj sentima ĵurnalisto devis oponi ĉiujn ŝovinistojn, sed tute aparte la leviĝantan movadon de Hitler.

En tiu tempo de morala degeneriĝo Kurt Lenz kuraĝis levi sian elokventan voĉon kontraŭ barbareco kaj rifuzis fuĝi, ĉar li kredis, ke ĉiu el ni devas agi *kvazaŭ ĉio dependus de mi*.

Serio Stafeto n-ro 34
Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 380 g,
344 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-41-6;
prezo ĉe FEL: 19,20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 11,50 EUR

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - rebutiko@fel.esperanto.be

Hispanio: Maljusta justico

8

La 3an de februaro 2003 ĝendarmoj sigelis la enirejon de la ĵurnalo *Euskaldunon Egunkaria* [eŭskáldunón egúnkarjá]. Juan [hŭan] del Olmo, ĵugiŝto de la Nacia Kortumo, zorganta pri terorismo kaj aliaj elstare gravaj krimoj, estis ordoninta la fermon de la tiam sola ĵurnalo plene en la eŭska lingvo kaj la senkomunikan areŝton de dek el ĝiaj laboristoj surbaze de la kontraŭterorisma leĝo pro supozata kompileco kun la armita sendependisma grupo ETA.



Konfliktas kredoj, mortas miloj

11

Mortigitaj estas centoj da senkulpaj niĝerianoj, ĉefe virinoj kaj infanoj, pro konfliktoj religiaj. Aparte trafita, kaj ne la unuan fojon, estas la norda niĝeria regiono Plateau.



Popolajn kostumojn portas pupoj

16



Muzeon de pupoj el diversaj landoj decidis fondi en sia urbo Etsuo Miyoshi, prezidanto de internacia korporacio. La urbo, Higasiŝikagawa, sur la japana insulo Ŝikoku, estas konata pro ĉiujaraj pupfestivaloj.

politiko

HISPANIO	8
Maljusta justico	
AŬSTRIO	10
Pele surrele	
ELMIGRADO	10
Vizo-krizo	
NIĜERIO	11
Konfliktas kredoj, mortas miloj	
BALKANIO	11
Altranga protesto	
BALKANIO	11
Priviza vizito	
BELGIO	12
Tri regionoj: unu krizo	
ALBANIO	13
Protesto kaj progreso	

turismo

FRANCIO	14
Vizito al Vannes	

moderna vivo

FOLKLORO	16
Popolajn kostumojn portas pupoj	
BELGIO	17
Ponto per tunelo subfosita	
ABORTIGO	17
Panjo-kampanjo	
MUZIKO	18
Merkato dampita	

komputado

DE GUTENBERG AL IPAD	20
Parto 3:	
Apple iPad - ĉu revolucio aŭ evolucio?	

medio

FRANCIO	22
La ekologiaj nutraĵoj de AMAP	

libroj

Propraj nomoj	23
Bonvena ekpaŝo	24

enigmoj

Litera sudoko	25
Solve de litera sudoko (MONATO 1/2010)	25
Solve de la bilda enigmo (MONATO 4/2009)	25

poezio

Soneto	26
--------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: wickler.albert@gmx.net.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
> Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Venĝo



Kiam meze de aprilo erupciis la islanda vulkano Eyjafjallajökull kaj produktis gigantan cindronubon, islandanoj diris al si mem: „Nun ni povas venĝi kaj puni la kapitalistojn, kiuj pelis nian landeton preskaŭ en financon bankroton!” Kaj ĉiuj islandanoj kolektiĝis ĉirkaŭ la vulkano kaj plenpulme blovis la cindronubon en direkto al la eŭropa kontinento. Sekve dum pluraj tagoj ĉiuj avioj povis nek starti, nek alteriĝi kaj devis paŭzi en flughavenoj. La cindronubo haltigis la tutan avitrafikon en Eŭropo, tiel ke la kompatinda germana kanceliero Angela Merkel ne povis rekte hejmenveni el Usono; ŝi devis tranokti en Lisbono kaj surtere veturi al Berlino.

Similan situacion ni havis nur post la atenco de islamana teroristo la 11an de septembro 2001, kiam Usono malpermesis ĉiujn flugojn, ĉar oni timis, ke teroristoj povas kraŝigi pliajn aviojn. Sed nun la naturo haltigis la avitrafikon. Por mi

tio estis plia pruvo por mia delonga aserto, ke avioj ne kapablas flugi. Se ili povus flugi, ili devus havi flugilojn, kiel birdoj, abeloj kaj muŝoj. Ilin tute ne ĝenis la cindronubo, ĉar ili povas movi sin mem tra la aero. Kontraste, avio „flugas” nur kiel ĵetita ŝtono aŭ pafita kanonkuglo: pelas kaj ŝovas ĝin ne la rigidaj aloj, sed turbino, kiu ellasas kun granda rapido gason el malantaŭo. Tiaj avioj ne povas flugi tra cindronubo, ĉar la cindropartikloj ŝtopas la turbinojn, tiel ke mankas oksigeno necesa por bruligi la gason.

Miloj da pasaĝeroj do draste spertis la pruvon, ke jetavioj nur ŝajne flugas. Ekde lkaro la homo vane provis imiti la naturon kaj flugi propraforte, kiel birdoj kaj aliaj vivaj estaĵoj. Nun la naturo ankaŭ ĉi-terene montris al la homo, ke fojfoje ĝi estas pli forta, ol li. Cetere dio diris al Noa kaj lia familio post la diluvo: „Kaj vi fruktu kaj multiĝu, moviĝadu sur la tero kaj multiĝu sur ĝi” (Genezo 9:7). Li ne diris, ke ni moviĝu en la aero. Ĉu do eble tamen venĝis ne islandanoj, sed dio, kiu sendis la cindronubon por memori la homon pri la malpermeso moviĝadi en la aero?

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukaĵoj); represoj kaj tradukaĵoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzon oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo:

Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienca:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienca@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Ĉu satanisto povas administri ekleziojn?

Mi miras pri la kuriozaj asertoj de Vinko Oŝlak (MONATO 2010/4, p. 6), ke „la ateisma, rekte satanisma aŭ katolika religioj ... troviĝas samdistanco de la vera kristana kredo kaj ... efektiva novnaskiĝo“! Unufraze li (impone!) insultas kaj ateistojn kaj katolikojn (mi lasos al iu alia komenti pri la satanistoj). Unue pri ateismo: ateismo ne estas religio. Nekredo en dio ne estas religio, same kiel nekredo en fantomoj aŭ nekredo en nevideblaj rozkoloraj unukornuloj ne estas religio. Due pri katolikoj: postuli „novnaskiĝon“ kiel parton de „la vera kristana kredo“ ŝajnas tre arogante – certe ekzistas milionoj da kristanoj (kaj katolikoj, kaj aliaj), kiuj ne sekvas la saman mallarĝan kristovojon, kiel Vinko Oŝlak, kaj mi mem ne aŭdacus juĝi ilin kiel malverajn kristanojn, nek aserti, ke katolikoj (el kiuj multaj se-

rieze legas la Biblion) samdistancas de la Biblio kiel ateistoj (kiujn kutime ne interesas la Biblio), simple pro nesekvo de iu mallarĝa specifa doktrinero (kaj mi dubas, ke Jesuo mem estus tiom malakceptema pri la multegaj diversaj kristanoj en la mondo). Luj „veraj“ kristanoj ŝajnas pli malakceptemaj al aliaj „neveraj“ kristanoj, ol multaj nekristanoj ŝajnas esti ...

Russ WILLIAMS
Pollando

Ĉefa lingvo (2)

Mi ĝojas, ke la albana estas unu el la ĉefaj lingvoj en Eŭropo (MONATO 2010/5, p. 6), kaj mi ne intencis prisilenti albanajn radio- kaj televid-staciojn. Vi pravas. Ili estas elsendataj kaj kapteblaj persatelite en Eŭropo. Mi ne menciis ilin, ĉar temas pri satelito 16 gradojn oriente, kiun mi ne kaptas, ĉar mi ne disponas pri turnebla instalaĵo. Mi havas nur du fiksajn reflektilojn. Same

mi ne menciis plurajn baltajn staciojn, troveblajn sur la satelito *Sirius* je 5 gradoj oriente, nek la leceburgan kaj fri-san sur *Astra* je 23,5 gradoj oriente.

Jean Pierre VANDENDAELE
Belgio

Mi koleras!

Sur la kovrilpaĝo de la aprila numero de MONATO aperis la titolo „De Gutenberg al iPad“. Oni nun scias, aŭ devus scii, ke antaŭ Gutenberg koreoj uzis moveblajn literetojn por presi. Tio okazis en la 12a jarcento. Eŭropanoj devas nepre ĉesi kaŝi la meritojn el aliaj mondopartoj.

Mireille GROSJEAN
Svislando

Verdaj kontoj

Sekve al la evoluo de la monmerkato Flandra Esperanto-Ligo malaltigos la renton je la „Verdaj kontoj“ (fiksdataj mondeponoj) de 2 % al 1,75 % ekde la 1a de junio 2010. Pliajn informojn la legantoj povas trovi en Interreto: www.esperanto.belfel/fin/verdakon.php.



La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado.

Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Katolikaj skandaloj

Stefan MAUL

„Kaj kiu akceptos unu tian infanon en mia nomo, tiu akceptas min; sed kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon de la maro.” Tiel predikis Jesuo laŭ Sankta Mateo 18,5-6. Se la nuntempa katolika eklezio tiel draste punus siajn pastrojn, kiuj seksume misuzadis infanojn, ĝi bezonus tre multajn muelŝtonojn. Jam de pluraj jaroj la skandaloj pri krimintaj sacerdotoj skuas la katolikan eklezion, unue ekzemple en Usono, poste en Irlando kaj nun ankaŭ en Germanio kaj Belgio.

Kardinalo bremsis

Ke tiaj krimoj okazis ankaŭ en Germanio, havas apartan signifon, ĉar la nuna papo estas germano. Benedikto la 16a, kun ordinara nomo Joseph Ratzinger [josef rácinger], estis episkopo de Munkeno antaŭ siaj oficoj en Romo, unue prefekto de la kongregacio pri la doktrino kaj nun do papo. En la diocezo Munkeno sub la egido de Ratzinger estis minimume unu pederasta pastro, kiu seksume misuzadis infanojn kaj tamen rajtis daŭre resti sacerdoto kun konstantaj kontaktoj al infanoj. Ne estas klare, ĉu la nuna papo mem sciis pri la afero kaj aprobis ĝin aŭ ĉu estis liaj subuloj, kiuj ĝis tiu ĉi jaro kaŝis tiun skandalon. Aliflanke estas klare, ke kardinalo Ratzinger kiel la ĉefo de la doktrin-kongregacio respondecis pri disciplinado de krimintaj pastroj. Minimume pri unu tia kazo en Usono estas konate, ke la kardinalo provis kaŝi la aferon, prokrastante decidon dum pluraj jaroj.

Kia dimensio?

Oni scias, ke la plej multaj seksuaj misuzadoj okazas interne de familia rondo. Tial la germana kriminalisto Christian Pfeiffer [kristian fajfer] avertas, ke oni atentu la dimension de tiuj

kazoj: Laŭ la statistiko dum la pasintaj 15 jaroj en Germanio estis ĉ. 138 000 tiaj krimuloj, inter kiuj estis entute „nur” ĉ. 147 katolikaj sacerdotoj, t. e. 0,1 %. (Oni tamen atentu, ke ĝuste en tiu ĉi kampo la oficialaj nombroj sendube estas minimumaj, ĉar tre multaj krimoj restas ne malkovritaj; kaj ni scias, ke precipe la katolika eklezio provis kaŝi ilin laŭeble antaŭ la publiko.) Bone, oni ja respektu tiun dimension por ne troigi akuzojn, sed ĉu ne en katolika eklezio, kiu tiom alte tenas sian moralan doktrinion, kaj predikas ĝin al ĉiuj homoj, eĉ unu tia krimo estas unu tro?

La eklezio tamen estas bonŝanca, ĉar la plej multaj krimoj, kiuj nun konatiĝis (kaj ankoraŭ konatiĝas) jam preskriptiĝis. Kial? Psikologoj klarigas, ke naivaj infanoj plej ofte ne vere perceptas, kio okazas al ili; ili akceptas la krimon pro infana fido al siaj edukantoj: se la bona kaj amata instruisto faras ion tian, tio ne povas esti io malbona. Do ili silentas. Krome, se infano vere ne estas certa pri la afero kaj eble rakontas ĝin al siaj gepatroj, tiuj ankaŭ ofte ne kredas al la infano – kio ne povas esti, tio ne estas. Probable la infano nur fantazias, ĉar oni ja estas tre kontenta pri la bona edukado fare de pastroj.

Familia sfero

Precipe multe la krimoj okazas en prestiĝaj katolikaj internejoj, gvidataj de monaĥoj (kiujn la infanoj nomas „patroj”), do en kvazaŭ familia sfero. Kaj infanoj, kiuj iel tamen komprenas, ke jen okazas io malpermesita, do peko, pro honto silentas. Nur kiam ili estas jam plenkreskuloj, do longe post la preskripta periodo, ili kuraĝas paroli pri la afero kaj malkaŝi ĝin. Kaj se iuj komencis publikigi tiajn krimojn, tio kuraĝigas ankaŭ aliajn koncernatojn. Tial do nun ekzemple en Germanio multigiĝis riproĉoj kaj akuzoj kontraŭ sacerdotoj.

La episkopoj dum terure longa tempo ne sciis, kiel reagi kaj kiel konvene agadi pri tiuj skandaloj. Komence oni

provis ofte, kiel antaŭe, kaŝi kaj kamufli; oni koncedis kaj konfesis nur tion, kio fariĝis evidenta kaj ne plu estis kaŝinda. Oni provis protekti siajn sacerdotojn kiel ĉiam antaŭe, sed sub la premo de riproĉa kaj akuzita publiko kaj precipe pro la pli kaj pli multaj homoj, kiuj kuraĝe publikigis la krimojn, kiujn ili suferis infanaĝe, la eklezio komencis mem esplori la kazojn kaj ankaŭ transdoni al ŝtataj prokuroroj. Fine ankaŭ Benedikto la 16a trovis klarajn vortojn de honto kaj pardonpeto, konfeso de kulpo.

Celibato

Tro malfrue. Pro la hezitaj taktikoj kaj prokrastoj la eklezio intertempe preskaŭ komplete perdis sian moralan prestiĝon kaj sian kredindecon. Naŭzite kaj perdinte siajn iluziojn, katolikoj amase forlasis sian eklezion per ekŝiĝoj. La damaĝo por la katolika eklezio estas giganta. Al tio kontribuis ankaŭ tiuj episkopoj, kiuj stulte akuzis la „seksuman liberaliĝon” de la socio, kaj tiel volis senkulpigi siajn sacerdotojn. Vane. Simile vana estis la aserto de iuj episkopoj, ke kompreneble oni tute ne rajtas kulpigi la celibaton pri tiaj krimoj. Fakte estas, ke la nombroj de samaj krimoj kompare al la katolika eklezio en aliaj kristanaj eklezioj, kies pastroj rajtas edziĝi, estas preskaŭ neglektindaj. Evidente la celibato favoras pederastojn – la viktimoj ja estas ekskluzive knaboj.

Reform-koncilio necesas

La katolika eklezio troviĝas en grava krizo. Ĝi nepre devas reformi sian seksmoralon, forigi la mezepokan celibaton kaj solvi multajn aliajn problemojn, kiuj turmentas la fidelulojn. La tre konservativa kaj rigida profesora papo ne kapablas solvi tiujn problemojn. Urĝas la tempo, ke li kunvoku reform-koncilion, se li volas savi sian „eternan” eklezion. Li memoru pri la muelŝtonoj! ■

PITERART



Maljusta justico

La 3an de februaro 2003 ĝendarmoj sigelis la enirejon de la ĵurnalo *Euskaldunon Egunkaria* [eŭskaldunón egúnkarjá]. Juan [hŭan] del Olmo, juĝisto de la Nacia Kortumo, zorganta pri terorismo kaj aliaj elstare gravaj krimoj, estis ordoninta la fermon de la tiam sola ĵurnalo plene en la eŭska lingvo kaj la senkomunikon areston de dek el ĝiaj laboristoj surbaze de la kontraŭterorisma leĝo pro supozata komploteco kun la armita sendependisma grupo ETA („Euskadi ta Askatasuna” [eŭskadi táskatásuná]).

Konsterne li bazis sian sintenon sur malnovaj dokumentoj, per kiuj kvin jarojn antaŭe Baltasar Garzón [baltasár garsóŭn], enketita juĝisto de la sama kortu-

mo, estis ferminta alian eŭskan ĵurnalon, *Egin* [egínj]. En la postaj monatoj sekvis pliaj arestoj de suspektatoj.

Polico

Sep jarojn poste, la 12an de aprilo 2010, tri juĝistoj de la Nacia Kortumo verdiktis la absolvon de la kvin ankoraŭ procesataj estroj, kaj deklaris, ke la akuzo estas senbaza, ke la polico mis-esploris ĝin, kaj ke la fermo de ĵurnalo kontraŭas la konstituciajn garantiojn pri esprim-libereco.

Sekve de la fermo, la ĵurnalo mal-aperis, ĝiajn posedaĵojn disvendis tribunalaĵ administristoj, 150 laboristoj restis senlaboraj kaj la eŭsklingvanoj devis atendi la starigon de nova ĵurnalo, *Berria* [bériá]. Tiu ĉi fakte aperis kelkajn monatojn poste, plejmulte surbaze de la sama skipo, danke al ondo de solidareco kaj al la engaĝiĝo de la laboristoj en la projekto, kio permesis kunigi la minimume necesajn financajn rimedojn.

Protestoj

Aliflanke, la en- kaj eksterlandaj protestoj kontraŭ la fermo de la ĵurnalo estis ne atentataj, kaj eĉ la tiama ministro pri internaj aferoj, de la konservativa Popola Partio, asertis, ke „per la arestoj estas pruvita la rilato inter la ĵurnalo kaj ETA”, kiel MONATO informis en aprilo 2003.

Tamen la verdikto de la Nacia Kortumo asertas tute malsamajn aferojn. Ĝi taksas la akuzon eĉ „nekomprenebla”. Ĝia teksto diras, ke „la akuzantoj ne pruvigis, ke la procesatoj havas la plej malgrandan rilaton kun ETA” kaj aldonas: „Krom tio, oni ankaŭ ne konfirmis rekte

aŭ malrekte, ke la ĵurnalo *Euskaldunon Egunkaria* defendis la sintenojn de la terorisma bando, publikigis unu solan artikolon favoran al terorismo aŭ de la teroristoj, aŭ ke ĝia ideologia sinteno havis difinitan politikan kliniĝon; ĉi-lastata afero, cetere, ne estus delikta”.

Kritikoj

La kritikoj de la verdikto kontraŭ la enketita juĝisto estas ne malpli drastaj en tio, kio koncernas la fermon de la ĵurnalo: „La provizora fermo de *Euskaldunon Egunkaria*, la sola ĵurnalo, kiu ekzistis en la eŭska lingvo, ne havis rektan konstitucian rajtigon nek specifan kaj eksplicitan leĝan normon permesantan ĝin”.

Ĝi eĉ konsideras, ke la tuta proceso devenas el persekutemo kontraŭ la eŭskaj lingvo kaj kulturo: „La mallarĝa kaj erara starpunkto, ke ĉion en rilato kun la eŭska kaj la kulturo en tiu ĉi lingvo ETA nepre instigas aŭ kontrolas, kondukas en la kriminala proceso al mistakso de la datumoj kaj faktoj kaj al senbazeco de la imputado”.

Kulmino

La verdikto, do, konsideras la enketon fuŝa kaŭze de antaŭjuĝoj. Tamen la profesoro pri kriminala juro de la Madrida Aŭtonoma Universitato, Manuel Cancio [manuéel kansjo], opinias, ke ne temis nur pri justica eraro, sed pri „la kulmino de krima antaŭplanita politiko celanta konfuzi tion, kio estas idea apogo, kun tio, kio estas apogi terorisman organizaĵon. Ne okazis nur, ke la enketita juĝisto misagis, kion mi ne diskutas, sed tio estas konsekvenco de ĝenerala agado pere de nova interpreto de jurispru-



Martxelo Otamedi, direktoro de Euskaldunon Egunkaria, kiam ĝi estis fermita.

HTTP://GAMWIPEDIA.ORG/WWW/FIXER/MARTXELO_OTAMEDI.JPG

denco en la lastaj 15 jaroj, kiu kondukis nin ĉi tien”.

La verdikto estas mult-aspekte skua por la hispana justico, sed unu el ĝiaj esencaj punktoj estas ĝia pritrakto de la denuncoj de la akuzitoj pri torturoj fare de la polico. „La verdikto ne asertas, ke la akuzitoj estis torturitaj, ĉar ĝi ne povas tion fari”, klarigas la ĉefa hispana ĵurnalo, la progresisma *El País*.

Kuracistoj

Tamen la verdikto memorigas, ke la akuzitoj detale priskribis torturojn dum la proceso kaj pli frue antaŭ la enketaj juĝistoj, kaj ke la agoj priskribitaj de la procesatoj „akordas kun tio, esprimita en la informoj de la juraj kuracistoj post ilia esplorado en la arestejo”. Sekve eventuale estis torturoj, sed la enketaj juĝistoj decidis ne esplori ilin.

Ne malpli zorgiga montriĝas la fakto, ke jam du eŭskaj ĵurnaloj estis fermitaj, malgraŭ ke tion kontraŭas la hispana leĝaro. Ĝuste la 26an de majo de la pasinta jaro la Supera Kortumo verdiktis, ke oni ne rajtis fermi ankaŭ *Egin*, kvankam en tiu okazo la justico taksis, ke diversaj membroj de ĝia administra konsilio kulpis pri kunlabo-

rado kun ETA. Tiuj precedencoj ne certigas, ke, malgraŭ la du verdiktoj, nova enketaj juĝistoj ne decidis refoje fermi alian suspektan gazeton.

Manipulado

Fakte la politikigo de la justico en Hispanio kaŭzas pli kaj pli konsternajn situaciojn, kiuj serioze endanĝerigas ĝian rajtecon. Ne nur juĝistoj, kun la subteno de la ŝtata prokurorejo, povas kontraŭkonstitucie sekvestri ĵurnalojn kaj vendi ĉiujn ĝiajn proprietojn dum la enketado, sen atendo de verdikto, aŭ ili povas rigardi flanken, se ili ricevas denuncojn pri torturoj – eĉ fare de neriproĉeblaj kultur-agantoj, kiel tiuj de *Egunkaria* –, sed ankaŭ la politika manipulado de la justicaj organoj fare de la partioj estas okulfrapa.

La Konstitucia Kortumo havas duonon de sia anaro, kiu mortis aŭ de longe finis sian principan mandaton, sed la partioj ne kapablas interkonsenti ĝian renovigon. Krome, okaze de gravaj diskutoj ĝi fariĝas plia politika areno. Ekzemple, pri la nova Statuto de Aŭtonomio de Katalunio stariĝis eĉ okpetoj de malignosko de juĝistoj fare de preskaŭ ĉiuj eblaj parlamentaj partioj,

kio grave plisenkreditigis la konsiston de la kortumo.

Disputoj

Fakte pasis preskaŭ kvar jaroj da seneliraj disputoj pro la kataluna ĉefleĝo. La 16an de aprilo kvinan proponon de rezolucio malakceptis plimulto de la kortumo, el kio sekvas vica ŝanĝo de juĝisto-raportanto, kiu devos verki novan proponon de rezolucio, kio verŝajne plilongigos la debatojn almenaŭ plurajn monatojn.

Tio evidentiĝas, ke la kortumo ne atingos jure bazitan verdikton, sed rezolucion precipe kuŝantan sur la politika sinteno de la juĝistoj, agantaj kvazaŭ nova ĉambro de la parlamento.

Kotĵetado

Sed tiu kotĵetado ne limiĝas al la Konstitucia Kortumo. Siavice la progresisma juĝisto Baltasar Garzón, internacie disfamiĝinta pro sia translima persekutado de anoj de la ĉilia kaj argentina diktatorecoj surbaze de la tiel nomata „universala justico”, akumulas tri procesojn kontraŭ si, kiujn liaj apogantoj taksas politikaj.

Kelkaj el tiuj akuzoj estas farataj de novfaŝismaj organizaĵoj, same kiel okazis ĉe *Egunkaria*, dum ili suspektinde koincidas en la tempo kun liaj esploroj pri koruptado en la Popola Partio, la ĉefa dekstra partio en Hispanio. Ĝuste lia kazo transiris la hispanajn limojn kaj Garzón kolektis rimarkindan apogon tra la monda gazetaro.

Eraroj

Sed juĝisto Del Olmo apenaŭ riskas proceson, malgraŭ siaj multflankaj gravaj eraroj dum la enketo de la kazo *Egunkaria*. En Hispanio, kiel en aliaj landoj, okazas ege malofte, ke juĝiston oni konsideru kulpa pri malleĝa agado. Sed fojfoje tio eblas.

Tiel okazis, kiam la Supera Kortumo kondamnis en 1999 la juĝiston de la Nacia Kortumo Javier Gómez de Liaño [ĥabjér gomes de ljanjo] pro senbaza persekutado kontraŭ la ĉefa akciulo de la



Manifestacio en Bilbo (Eŭskio) en decembro 2009 por Euskaldunon Egunkaria.

gazeto *El País*. Tamen la tiama registaro de la Popola Partio, el kontraŭa signo de la gazeto, tuj forpardonis lin, evidentiĝante la intimajn filiiĝojn inter politiko kaj justico. Ke en 2008 la Eŭropa Kortumo de Homaj Rajtoj taksis, ke Gómez de Liaño ne ricevis justan juĝon, plifortigas la suspektojn pri la senpartieco de la justico en Hispanio.

Kompensoj

Sed plia problemo de la hispana justico estas, ke la civitanoj apenaŭ povas defendi sin kontraŭ ĝiaj eraroj. Verdikto de la Nacia Kortumo ne rajtigas

la damaĝitojn je kompensoj. Por tio ili devos iniciati novan proceson. Tamen, se la akuzantoj apelacios al la Supera Kortumo, la tuta prijuĝo de eventualaj kompensoj estos haltigita ĝis verdiktado de la plej alta juĝinstanco, kiu ne okazos antaŭ paso de pluraj jaroj.

Kaj tio, ke la akuzantoj estas nuntempe du organizaĵoj ligitaj al la ekstrema hispana naciismo – ĉar la popola akuzo retiriĝis tri jarojn antaŭe (post ŝanĝo en la registara partio) –, kredigas, ke tiel okazos. La hispana justico montriĝas ostaĝo de neinterakordiĝemaj politikistoj kaj de ekstreme dekstraj grupoj.

Hektor ALOS | FONT

AŬSTRIO

Pele surrele

En la viena amuzkvartalo *Prater* okazis en marto la dua drezina vetkurado. Drezino estas malpeza surrela veturilo, ĝenerale kvarrada, uzata por transporti relojn kaj aliajn fervojajn materialojn. Ĝin kreis la germana nobelo Karl Drais [drajs] (1785-1851), kiu inventis ankaŭ pianoludan registrilon kaj skribomaŝinon.

Por la tago de la vetkurado oni prognozis mildan printempan tagon, sed fakte kuŝis iom da neĝo sur la herbejoj. La evento evoluis sur la reloj de etŝpura fervojo *Liliputbahn*. Ĉiu inter 8 kaj 99 jaroj rajtis partopreni kaj, paginte 30 eŭrojn, uzi je propra risko memkonstruitan drezinon.

Skoltoj

La unuan premion ricevis skolta grupo el Vieno, kiu gajnis jam ĉe la unua vetkurado. La skoltoj bezonis nur 87 sekundojn por la 1500-metra distanco. Gravis por venki ne nur rapido, sed ankaŭ prezentado, aktorado dum la ve-



Multe amuzis spektantojn ne nur la drezinoj, sed ankaŭ la aktorado de la veturigistoj.

turo kaj konstruado de la veturilo.

En la epoko de Drais drezino estis speco de prabicyklo, kiu dependas de homopovo. Nuntempe, ankoraŭ malpezaj, ili iufoje uzas motorojn. Ili servas turismon kaj tiel helpas savi etŝpurajn fervojojn.

Walter KLAG

ELMIGRADO

Vizo-krizo



LUCAS THE EXPERIENCE

Tuj post la liberaligo de vizoj por civitanoj de Serbio, Makedonio kaj Montenegro, konstateblis eliro el tiuj landoj al okcidenta Eŭropo. Tio rimarkblas aparte en la plej malriĉaj sociaj tavoloj kaj regionoj, ekzemple en okcidenta Makedonio kaj suda Serbio, kie loĝas albanoj.

Post la 19a de decembro 2009 nur el Kumanovo en Makedonio elmigris al Belgio ĉirkaŭ 3400 albanaj junuloj kaj viroj. Ili serĉis tie postenojn kaj azilon. El la regiono de Preŝevo, suda Serbio, elmigris jam ĉirkaŭ 20 000 homoj.

Laŭ albanaj politikistoj, fenomeno tia ekonomie kaj demografie malutilas al la koncernaj regionoj. Krome povas esti, ke estos prokrastita la akcepto en la Ŝengen-zonon de Albanio, Kosovo, Bosnio kaj Hercegovino, kiuj ankoraŭ ne akiris rajton pri libera moviĝo tra EU-landoj.

Bardhyl SELIMI

Konfliktas kredoj, mortas miloj



La libia ŝtatestro Muammar Gaddafi.

Mortigitaj estas centoj da senkulpaj niĝerianoj, ĉefe virinoj kaj infanoj, pro konfliktoj religiaj. Aparte trafita, kaj ne la unuan fojon, estas la norda niĝeria regiono Plateau.

Jam en 1999, kaj ankaŭ en 2001, batalis kristanoj kaj islamaj ĝihadistoj. Pereis miloj da homoj kaj estas bruligitaj preĝejoj kaj aliaj sanktejoj. La tiama prezidento de Niĝerio, Oluse-

gun Obasanjo, deklaris krizon kaj laŭ la konstitucio forigis por ses monatoj la demokratie elektitan ŝtatestron Joshua Dariye.

La ĉi-jara konflikto aparte brutalis. Meznokte alvenis al la vilaĝo Doho Haran atakantoj, kiuj mortigis dormantojn kaj bruligis domojn. La regiona estro de Plateau, Jonah David Jang, mem kristano, informis, ke la armeo, gvidata de islamano, ne protektis la vilaĝon, malgraŭ raportoj pri planata atako.

Fremduloj

Poste Jang kulpigis la najbaran regionon Bauchi kaj Fulan-islamanojn pri la murdoj. Fulanoj loĝantaj en precipe kristana Plateau ne rajtas kandidatiĝi dum lokaj elektoj kaj la kristanoj taksas ilin fremduloj. Tial la kristanoj nun iĝas viktimoj ne nur en norda Niĝerio.

La religia krizo akiris afrikan dimension. La libia ŝtatestro Muammar Gaddafi diris, ke, por atingi pacon en Niĝerio, la lando estu dividita inter kristana sudo kaj islama nordo. Kolere reagis la niĝeria registaro, ordonante, ke la libia ambasadoro hejmen reiru.

Tamen amaskomunikiloj en Niĝerio montras diversajn opiniojn pri la konsilo de Gaddafi. Kelkaj kritikis la libian ŝtatestron, nomante lin teroristo. Aliaj kredas, ke ja solviĝos la religiaj problemoj, se estus dividita Niĝerio laŭ religiaj aŭ etnaj principoj.

Princo Henriko OGUINYE/pg

Altranga protesto

Pro malbona konduto estis maldungitaj 29 oficiroj de albana taĉmento en Afganio tuj post sia reveno hejmen. Pliaj sep altrangaj oficiroj estis degraditaj. La oficiroj, al kiuj oni promesis 60 usonajn dolarojn tage, ricevis nur 54. Pro tio, kaj proteste, ili ne plenumis ĉiujn siajn devojn en eksterlando.

Bardhyl SELIMI

Priviza vizito

Antaŭ nelonge la albana ministro pri eksteraj aferoj, Ilir Meta, cetere vic-ĉefministro, vizitis la serban ĉefurbon Beogrado. Tie li diskutis kontaktojn inter Albanio kaj Serbio surkampe de ekonomio, transporto, sekureco, turismo kaj minoritatoj.

Ministro Meta invitis serbojn viziti servize Albanion (kio eblas jam de pluraj jaroj), kaj petis la serban prezidanton samon permesi por albanoj dezirantaj viziti Serbion.

Minoritato

Tiam la ministro vizitis la valon de Preŝevo, sude en Serbio kaj najbare al Kosovo kaj Makedonio, kie loĝas albana minoritato.

Nuntempe Serbio kaj Albanio ĝuas normalajn politikajn kaj ekonomiajn rilatojn. Tio kontribuas al paca disvolviĝo kaj stabileco en la regiono.

Bardhyl SELIMI

Tri regionoj: unu krizo



La politika situacio en Belgio povas ŝanĝiĝi de tago al tago. Kion oni notas hodiaŭ, eble morgaŭ ne plu estos aktuala. Tamen jen provo klarigi la fonon de la nunaj krizaj eventoj.

Belgio konsistas el tri lingvaj komunumoj: la nederlandlingva, la francalingva kaj la germanlingva. Nederlandlingvanoj – flandroj – kaj francalingvanoj pli kaj pli ofte havas kontraŭajn starpunktojn pri politikaj problemoj.


Krom lingvaj komunumoj ekzistas tri parte aŭtonomaj regionoj: la flandra, la valona kaj la brusela. Principe loĝantoj de la flandra regiono povas voĉdoni por flandraj kandidatoj, loĝantoj de la valona regiono por valonaj kaj tiuj de la brusela regiono por bruselaj. La tri regionoj plu estas dividitaj en balotaj distriktoj. Ekzistas tamen unu balota distrikto, kiu etendiĝas tra du regionoj, nome la ba-

lota distrikto Brussel-Halle-Vilvoorde, kiu troviĝas parte en la brusela regiono, parte en la flandra. Sekve en tiu distrikto personoj loĝantaj en Flandrio povas voĉdoni por kandidatoj en la najbara Bruselo kaj inverse.

La konstitucia kortumo jam antaŭ multaj jaroj avertis, ke tiu situacio estas kontraŭkonstitucia, kaj ke la balotdistrikto Brussel-Halle-Vilvoorde devas esti disigita en du apartaj distriktoj, unu brusela kaj unu flandra. La disigo tamen ĝis nun ne okazis, ĉar bruselaj francilingvaj deputitoj, kiuj kutimis ĉerpi voĉojn en la najbara Flandrio (kaj post la disigo ne plu povus ilin rikolti), bremsis tion.



En Belgio vivas 3 komunumoj (popoloj) kaj estas 3 regionoj (subŝtatoj). Sed la komunumoj kaj regionoj nur parte kongruas.



La okcidenta parto de la provinco Flandra Brabanto estas la balota distrikto Brussel-Halle-Vilvoorde. Ĝi estas la sola belga balota distrikto, kiu etendiĝas tra du regionoj, la flandra kaj la brusela.

Ĉefurbo

Tiu ĉi situacio estiĝis, ĉar multaj francilingvanoj en la dulingva ĉefurbo Bruselo fuĝis el la urbo kaj ekloĝis ofte en flandraj municipoj ĉirkaŭ la urbo. Anstataŭ asimiliĝi, tiu ĉi kreskanta komunumo provis akiri avantaĝojn por uzi la francan ankaŭ en kontaktoj kun la oficialaj instancoj.

Per politika premo ĝi akiris la eblon voĉdoni por francilingvaj kandidatoj. Sed la konstitucia kortumo opinias, ke tiel perfortiĝas la egaleco por ĉiuj belgoj. Do necesas ŝanĝi la situacion. Kaj tiu problemoj ĝis nun ne trovis solvon.

Eks-ĉefministro Dehaene [dehane], komisiita de la reĝo, faris finan provon

trovi kompromison ĝis la 18a de aprilo. Finfine politikistoj de la registaraj partioj anoncis la 21an, ke necesos ankoraŭ pliaj tagoj.

Registaro

La juna prezidanto de la flandra liberala partio VLD, Alexander De Croo [aleksander de kro], surprizis, anoncante, ke lia partio ne plu fidis la registaron kaj do ĝin forlasos. Tio estigis registaran krizon. La aliaj registaraj partioj ŝokiĝis kaj parolis pri nedefendebila mispaŝo en la nuna malfacila momento, ĵus antaŭ la EUprezidenteco de Belgio.

Tamen la paŝo de De Croo kompreneblas, nur kiam oni konscias, ke jam de post 2007 la federacia registaro paraliziĝis pro internaj tensioj precipe inter la du ĉefaj komunumoj en Belgio. Necesaj malfacilaj decidoj prokrastiĝas pro senĉesaj palavroj: la problemo Brussel-Halle-Vilvoorde simptomas.

Ĉi-riate indas skizi la ekonomian evoluon en Belgio en la 20a jarcento. Ĝis la 50aj/60aj jaroj, Flandrio estis precipe kampara kaj malriĉa. La franclingva Valonio estis forte industriigita precipe pro karbominejoj kaj la alligita ŝtalindustrio. Centmiloj da flandroj tien migris por trovi laboron.

Industrioj

Sed en katastrofe surpriza ritmo la karbominejoj perdis sian rolon kaj ankaŭ la ŝtalindustrio grandparte kolapsis. Dume Flandrio akiris novajn industriojn kaj fariĝis la riĉa regiono de Belgio. Rezulte okazis ĉiam pli grandaj transpagoj de Flandrio al Valonio. Facile kompreneblas, ke valonoj preferas konservi tiujn avantaĝojn kaj ĝis hodiaŭ politike provas prokrasti strukturajn ŝanĝojn.

En la 21a jarcento flandraj industriistoj rimarkas, ke la flandra bonfarto ankaŭ ekŝrumpas kaj ke la regiono bezonas modernigon. La modelaj belgaj sociaj strukturoj (pensioj, sanasekuro, senlaboraj kompensoj ktp) endanĝeriĝas. Urĝe necesas malfacilaj

decidoj por savi ilin. Sed la valona kaj brusela konservemo bremsas tiun strebon.

Laŭ flandroj estus pli bone, se ĉiu komunumo kaj la brusela regiono mem respondecu pri siaj en- kaj el-spezoj. La fakto, ke flandroj strebas al rapida ekago, dum franclingvanoj preferas longdaŭrajn intertraktadojn, pliakrigis la komunumajn tensiojn. Tio certe influis la decidon de De Croo, kiu ne havas politikan sperton, sed ĝis nun ofis en industrio.

Proponoj

Jam samvespere, kiam VLD forlasis la registaron, De Croo anoncis sian pretecon denove pritrakti la temon Brussel-Halle-Vilvoorde, kondiĉe ke oni preparolu la proponojn de la peranto Dehaene. Oni do supozas, ke per lia elpaŝo li precipe emis trudi rapidan decidon.

Tuj la franclingvaj liberaluloj esprimis, ke ili deziras esencajn kompletigojn de tiuj proponoj. Konstitucia krizo fariĝas reala. Tamen la plimulto de la belgoj deziras, ke Belgio pluekzistu, sed en alia formo: Nun oni pli kaj pli parolas pri konfederacio, en kiu la tri regionoj decidu, kion ili deziras kune fari kaj kion fari mem. Sed por starigi tian konfederacion, necesos finfine iu interkonsento.

IVO DURWAELE

La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio,

**butiko@fel.esperanto.be
aŭ www.retbutiko.net
kontraŭ 9,50 eŭroj
+ afranko.**

ALBANIO

Protesto kaj progreso

Protestis la albana ministro pri eksteraj aferoj Ilir Meta pro la insulta konduto de grekaj soldatoj kontraŭ albanoj.

La soldatoj, partoprenantaj paradon en Ateno okaze de la greka tago de sendependeco, kriis, ke albanojn ili murdos kaj el ilia haŭto kudros siajn vestojn. Plue, spite al leĝo pri la egalaj rajtoj de enmigrintoj akiri grekan ŝtatanecon kaj la deklaro de la greka ĉefministro Papandreu, ke „greko estiĝas ne nur denaske, sed ankaŭ poste”, la soldatoj kriis, ke „greko naskiĝis, ne estiĝos”.

Suspendo

Pro la insulto pardonpetis la greka registaro. La ministro pri defendo suspendis la oficiron, kiu respondecis pri la koncernaj soldatoj.

Malgraŭ tiu ĉi incidento, interrilatoj politikaj kaj ekonomiaj inter Albanio kaj Grekio bone progresas. La estonteco de pli ol 800 000 albanaj rifuĝintoj en Grekio iĝas pli esperiga. Koincide, je la sama tago de la parado la albana parlamento aprobis du pliajn tombejojn por grekaj soldatoj falintaj en Albanio dum la milito itala-greka en 1940.

Bardhyl SELIMI



Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net

FRANCIO

Vizito al Vannes

En nord-okcidenta Francio kuŝas Vannes [van] (bretone Gwened [gŭinjét]) – vidinda urbo kun unika mezepoka parto. La urbo situas norde de la Golfo de Morbihan, profunde eniĝinta en la teron, ĉe Atlantika Oceano. Vannes ekzistas pli ol 2000 jarojn kaj estas unu el la plej malnovaj urboj en Bretonio.

Fine de la 1a jarcento antaŭ Kristo la romianoj fondis setlejon Darioritum sur la teritorio de kelta tribo venetoj (france *vénetes*), de kiu devenas la nuna urbonomo. Ĝis la 19a jarcento la mara komerco estis por Vannes grava fonto de riĉiĝo. Laŭlonge de la jarcentoj la urbo prosperis per komerco kun Hispanio, Portugalio, Norvegio, Svedio kaj landoj ĉe la Balta Maro. Unu el la ĉefaj specoj de komerco estis la vina. Tamen pro enŝlimiĝo oni senĉese devis modifi la haven-instalaĵojn. Multnombraj ŝipkonstruejoj ekestis sur la kajoj.

Remparoj

En la 3a jarcento oni konstruis remparojn, kiuj ĉirkaŭis la urbon por defendi ĝin kontraŭ atakoj de barbaroj. Tamen kun areo de nur kvin hektaroj ĝi estis ĉefe rifuĝejo. Poste en la 13a jarcento pro plimultiĝo de la loĝantoj, la tiama duko plilongigis la remparojn. Nuntempe nur parto de la muregoj videblas. La cetero estas aŭ detruita, aŭ kaŝita de aliaj konstruaĵoj. Ses rempar-pordegoj konserviĝis.

La **Pordego Sankta Vincento** datumas de la jaro 1620 kaj estas la ĉefa. Ĝi ne havis defendan rolon, ĉar neniu fortikaĵo estis ene. La pordego havis nur ornaman funkcion. Fronte de ĝi estas ŝildo, ornamita de la urba blazono. En la supera niĉo staras statuo de Sankta Vincento Ferrer, la patrono de Vannes. Poste

oni starigis grekstilajn kolonojn laŭ la tiama modo. La Pordego *Sankta Vincento* malfermas la urbon al la haveno, ĉe kiu troviĝas placo *Gambetta* kun duon-cirkloformaj domegoj el la 19a jarcento. Sur la kajoj staras ŝtonaj aŭ parte lignaj domoj, kiujn konstruigis ŝipposedantoj kaj negocistoj.

La **Turo Konestablo** staras meze de la orienta remparflanko. Ĝi datumas de la 15a jarcento. Ĝi portas la nomon de la estro de la duka armeo. La turo havas kvin nivelojn, kiujn kunligas du ŝraŭbformaj ŝtuparoj. Ĝi ne estis finita, ĉar la tiama duko de Bretonio, Francisko la Dua, preferis forlasi Vannes kaj ekloĝi en Nantes [nant]. En la unua nivelo estis loĝejo por soldatoj. Ankaŭ en la superaj etaĝoj kamenoj kaj larĝaj fenestroj atestas pri loĝado.

Maldekstre situas la **Pulva turo**. Oni vidas diferencon en la konstrustrukturo

de la murego: malsamajn ŝtonojn, malsamajn krenelojn kaj embrazurojn. Tio atestas, ke la konstruado okazis en du diversaj epokoj.

Paŝante orienten laŭlonge de la remparo kaj la rivero Marle, oni malkovras belajn francstile aranĝitajn ĝardenojn kaj la famajn **lavejojn**. Tie sub la galerio laboris lavistinoj. Oni reguligis la akvonivelon per kluzo. Malgraŭ la malnova aspekto la lavejoj datumas de la jaro 1820. Ili estis antaŭ nelonge renovigitaj.

Katedralo

La katedralo superstaras la urbon. En la 15a jarcento, la malnova romanikstila kirko estis renovigita kaj pligrandigita, ĉar pro pliigo de la pilgrimado al sankta Vincento Ferrer la preĝejo iĝis tro malvasta. Fronte de la katedralo estas statuo de la Sanktulo. Li estis hispana monaĥo, fama predikanto, kiu vojaĝis



Remparoj,



Lavejoj.

tra Eŭropo, farante miraklojn kaj resanigante malsanulojn. Aŭdinte pri li, duko Johano la Kvina venigis lin por klerigi la popolon. Post dujara predikado tra la duklando li revenis al Vannes malsana kaj senfortiĝinta. Vincento Ferrer mortis en 1419 kaj estis entombigita en la katedralo. Danke al la pilgrimado la episkopoj ricevis monrimedojn, kiuj ebligis transformi, pligrandigi kaj ornamu la katedralon.

Trabfakaj domoj

En la malnova urboparto oni vidas multnombrajn lignodomojn, kies tegmentoj preskaŭ kuntuŝiĝas. En la mezepoko oni konstruis malmultekoste domojn el ligno, sen najloj laŭ la tekniko de la tenono kaj mortezo. La trabkuniĝo funkciis nur per kejoj. Inter la traboj estis pajloargila mortero, kiu ne estis multekosta. La fundamentoj estis ĝenerale el ŝtono. La etaĝoj estis ofte pli vastaj ol la teretaĝo, pro tio ke la impostoj dependis de la okupita areo kaj krome ne estis granda loĝspaco en la urbo. Alia avantaĝo por tiuj komercistaj domoj: la superaj etaĝoj protektis la montratablojn de la komercistoj. Fakte, tiam la vendejoj estis sur la stratoj mem antaŭ la domoj. La vendistoj apogis la tablojn al la ŝtona fundamento. La plej granda danĝero por tiuj domoj estis la fajro.

Malgraŭ la brulegoj proksimume 170 lignodomoj konserviĝis en la urbo.

Fronte al **kastelo Gaillard** [ga-jár] – belega domo, en kiu estas nun antaŭhistoria muzeo – ĉe la angulo de trabfaka domo el 16a jarcento oni vidas skulptaĵon de du personoj, nomitan „Vannes kaj edzino”. Ĝi estas fama simbolo de la urbo. Oni ne scias, kiujn la

skulptaĵo prezentas. Verŝajne estis ŝildo, kies mesaĝo estas perdita.

Bazarhalo

La Cohue [kou] estis bazarhalo. Ĝi apartenis al la duko. Dum la 13a jarcento ĝi estis nur vasta halo por vendistoj. En la 15a jarcento la tribunalo, prezidata de la duko, funkciis en la unua etaĝo de konstruaĵo. Tiutempe oni pligrandigis la halon. La bretona parlamento kunvenis ĉi tie pro la forpelo en 1675 el Rennes [ren], la ĉefurbo de Bretonio. La kaŭzo estis, ke la parlamentanoj koleris kontraŭ la plialtigo de impostoj. Nun La Cohue estas pentraĵ- kaj skulptaĵmuzeo.

Elisabeth Le DRU



Vannes kaj edzino.



Trabfakaj domoj.

Popolajn kostumojn portas pupoj



Muzeon de pupoj el diversaj landoj decidis fondi en sia urbo Etsuo Miyoshi, prezidanto de internacia korporacio. La urbo, Higasi-kagawa, sur la japana insulo Ŝikoku, estas konata pro ĉiujaraj pupfestivaloj.

En Slovakio, kun helpo de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, li mendis dek pupojn, kiuj prezentas popolajn vestojn de kelkaj regionoj de Slovakio. En preparo estas ankaŭ partopreno de la slovaka „Teatro en kofro” de la pupteatraro Tomáš Plaszy el Košice, en la festivalo en Higasi-kagawa.

Al la ekesto de slovakaj popolaj kostumoj kontribuis unuflanke la klimataj kaj geografiaj kondiĉoj en Slovakio, kiu havas kaj ebenaĵojn kaj altmontarojn. Aliflanke la kostumoj havis simbolean funkcion: la kostumo fariĝis persona identigilo, speco de senvorta komunikado inter larĝaj tavoloj de la socio.

Socia tavolo

Laŭ la kostumo oni povis diveni, el kiu regiono la homo devenas, kian profesion kaj naciecon li aŭ ŝi havas, kaj al kiu eklezio kaj socia tavolo la homo apartenas. La kostumojn influis ankaŭ modo en historiaj periodoj, alireblaj teksaĵoj, kaj migrado de la loĝantoj. Fine de la 20a jarcento ekzistis en Slovakio sesdeko da tipaj kostumaj regionoj. Ili diferencis inter si per la uzita materialo, koloroj, sed precipe la tipaj ornamaĵoj.

La kostumojn vilaĝanoj produktis plejparte mem, uzante materialojn facile alireblajn: linon, kanabon, lanon kaj peltajn. Ekde la 18a jarcento oni ekuzis ankaŭ manufakture kaj poste fabrike produktitajn teksaĵojn.

Renesancaj modeloj

Sur slovakaj popolkostumoj oni povas vidi elementojn de volvaj kos-

tumoj kun simplaj fasonoj, sed ankaŭ brodaĵojn, trikaĵojn kaj kroĉetaĵojn, kies ornamaĵoj estis transprenitaj el renesancaj modeloj. Formoj de kelkaj partoj, kiel kufoj, korsaĵoj kaj mufoj, portas spurojn de baroko kaj rokoko. Ofte uzata estis la tekniko de blupreso.

Publika portado de popolaj kostumoj ekde la dua duono de la 19a jarcento malaperas, sed en iuj regionoj ĝi konserviĝis ĝis la unua duono de la 20a jarcento. Portado de popolaj kostumoj nuntempe estas rara, sed oni povas vidi ilin kelkloke sur maljunaj vilaĝanoj, precipe dum festotagoj.

Popolkostumoj tamen fariĝis tradiciaj vestaĵoj dum folkloraj festivaloj, solenaĵoj kaj festoj. Popolaj muzik- kaj danc-grupoj ofte uzas ilin surpodie por sia prezentado.

Stano MARČEK
Slovakio



La pupoj, ĉirkaŭ 40 cm altaj, montras kostumojn el diversaj partoj de Slovakio, inkluzive de la regionoj Piešťany (knabino, okcidenta Slovakio), Tekov (virino, suda Slovakio), Detva (knabo kaj knabino, meza Slovakio), Liptov (knabo kaj knabino, norda Slovakio), Goral (knabo kaj knabino, norda regiono sub la montaro Altaj Tatroj) kaj Zemplín (orienta Slovakio).

Ponto per tunelo subfosita

Antverpeno estas unu el la gravaj havenurboj en Eŭropo. Krome ĝi situas ĉe nodopunkto de transportlinioj tra Belgio de kaj al Francio, Nederlando, Germanio kaj Luksemburgo.

Jam antaŭ 30 jaroj oni pensis pri la minaco de trafik-ŝtopiĝo. Intertempe la problemo akutas. En 2003 la flandra registaro starigis instancon BAM, kiu neŭtrale kaj objektive, sen politika lobiado, pristudu solvojn. Tamen la situacio en Antverpeno estas duoble kompleksa. Unuflanke la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas tre dense loĝata. Aliflanke la haveno, kiu tuŝas grandajn loĝkvartalojn, estu maksimume atingebla.

Okulfrapa

En 2008 BAM diskonigis siajn planojn. La ĉefa, okulfrapa parto kombinis novan tunelon sub la rivero Skeldo kun aldona dunivela ponto, du kilometrojn longa, super loĝkvartaloj kaj haveno, por norde kompletigi ring-ŝoseon.

Baldaŭ aŭdiĝis protestoj. Pli gravis, tamen, agadgrupo, kiu mobilizis malkontentajn civitanojn, kiuj evidente ne ŝatas konstruaĵon tian super siaj tegmentoj.



Bela maketo pri ponto verŝajne neniam konstruota.

Ankoraŭ pli surpriza estas la fakto, ke plimultiĝis la grupoj – civitanoj, industriistoj, transportistoj –, kiuj sukcesis en minimuma tempo prezenti alternativojn kaj subfosi la argumentojn, kiujn BAM kolektis post kvin jaroj da multekostaj studoj.

Viglaj

La viglaj diskutoj, evidente ankaŭ inter politikistoj de opoziciaj partioj, kondukis al popolkonsultado. Strangas, ke la publiko devus solvi tiun kompleksan problemon. Rezulte: kondamnis la ponton 60 % de la respondintoj.

Kvankam popolkonsultado ne devigas la registaron (kontraŭe al referendumo), ĝi tamen lanĉis studon pri aliaj ebloj. Do daŭris internaj politikaj diskutoj.

Sekura

Fine la registaraj partioj prezentis duoblan solvon. Oni provizore decidis, ke tunelo anstataŭos la ponton, kondiĉe ke la eŭrop-unia instanco pri tuneloj deklaras ĝin sekura. Cetere ĝi ne kostu pli kaj ne necesu pli da tempo por ĝin realigi. Tiel gloris la urbestro Patrick Janssens [patrik jansens], kiu ludis ĉefan rolon en decido pri tunelo.

Se tiuj ĉi kondiĉoj ne plenumiĝos ĝis la somero, oni tamen konstruos la ponton. Por la infrastrukturo en kaj ĉirkaŭ la urbo oni antaŭvidas kvin miliardojn da eŭroj ĝis 2020. Ankoraŭ solvendas, kiamaniere la flandra registaro, kiu devos efektiviĝi ŝparojn en siaj buĝetoj, trovos tiun sumon.

Ivo DURWAELE

Panjo-kampanjo

Aperis en marto apudvoja afiŝo en Pollando kun bildo pri Adolf Hitler. La afiŝo avertis kontraŭ abortigo, kiun Hitler permesis en la tiam okupitaj teritorioj de Pollando por laboristinoj devige venigitaj el orientaj landoj.

Legiĝis surafiŝa teksto: „Abortigo por polinoj – enkondukita de Hitler la 9an de marto 1943.” Apude videblis du fotoj montrantaj la restaĵojn de abortigitaj infanoj.

Forgesas

La kunorganizanto de la kampanjo „Elektu vivon” diris, ke en la nuna Pollando oni ofte forgesas, ke ĉi tiuj unuaj leĝoj pri abortigo datiĝas de la okupacio. Nun estas planataj pliaj afiŝoj suraŭtaj en lokoj, kie la instancoj ne permesas kontraŭ-abortigajn ekspoziciojn.

En Pollando en 2008 okazis 499 laŭleĝaj abortigoj, el kiuj 477 rilatis al naskotoj malsanaj.

Stanisław ŚMIGIELSKI/pg



Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al moderna_vivo@monato.net

MUZIKO

Merkato dampita

La Muzikfoiro Frankfurto, indikilo kaj instigilo de la monda muzikmerkato, tutmonde la plej granda en tiu ĉi komerca branĉo, ankaŭ en 2010 altiris inter la 24a ĝis la 27a de marto grandan nombron de ekspoziciantoj, klientoj kaj muzik-entuziasmoj.

Kvankam la financa krizo en la lasta jaro reduktis je 25 % la mondan produktadon de instrumentoj, kaj je 30 % la komercadon de instrumentoj al la plej

granda merkato Usono, la nombro de ekspoziciantoj (1500, el kiuj du trionoj el eksterlando) kaj klientoj aŭ vizitantoj (ĉ. 80 000) restis konstanta.

Ciferecaj aparatoj

Iom malagrable sentiĝis la malĉeesto de pluraj tradiciaj entreprenoj, kaj malgrandaj kaj gvidaj, ekzemple en la branĉoj altkvalitaj elektronikaj orgenoj kaj klasikaj muzikeldonejoj. Aliflanke



bonstata montriĝis la merkato de diĝitaj aparatoj kaj akcesoraĵoj, aparte prezentataj en paralela foiro *Prolight + Sound* (*Lumo + Sono*), kiu ŝrumpigis, tamen ne katastrofe, permuzikajn enspezojn en 2009.

Kelkaj problemoj en tiu ĉi merkato ŝuldiĝas ne al la nuna ekonomia situacio sed al natura transformiĝo: konkurenco de aziaj ŝtatoj, reduktiĝo de la aĉetado de paperaj muziknotoj kaj fizikaj sonkonservoj, malpliigo de ŝtataj kaj aliaj subvencioj, ĝenerala diĝitigo de la muziko kaj ties disvastigado. Sed laŭ la foiraj organizantoj kaj la gvidaj komercantoj la nuna situacio enhavas ŝancojn kaj rajtigas al optimismo, almenaŭ je stabileco.

Specialaj konoj

La esperon pravigas la strukturo de la muzikmerkato. Ĝin ne dominas ne-travideblaj internaciaj entreprenoj, aviadaj je rapida rentumo, sed malgrandaj unuoj, ofte familiaj kun longa tradicio, kiuj povas rapide, adaptiĝeme kaj novige reagi al merkataj bezonoj, aŭ kiuj disponas pri specialaj konoj kaj varoj nemalhaveblaj.

Krom kelkaj gigantoj, ankaŭ la elektronika merkato disponas pri multaj etaj firmaoj kun specifaj interesoj. Ĝenerale la muzikbranĉo, ja ne senpere apartenanta al la tutaj vivbezonoj, tamen unualoke



Eblas ĉe la Muzikfoiro Frankfurto – la plej granda tiucela ekspozicio en la mondo – ne nur viziti la budojn de 1500 fakuloj, sed ankaŭ ĉeesti koncertojn kaj aliajn prezentaĵojn.

servas al la spirita kaj la distra ĉirkaŭaĵo de la homo, do certe senfine ŝanĝiĝos, sed neniam pereos.

Komfortigaj helpiloj

La plej grava celo de la Muzikfoiro Frankfurto estas memkompreneble la komercado de la plej diversaj muzikproduktaĵoj kiel instrumentoj, muziknotoj, komfortigaj helpiloj, aparatoj por sona kaj luma prezentado, akcesoraĵoj, laboriloj, gazetoj, koncertoj, muzikeventoj ktp.

Samtempe ekestas aŭ plifortiĝas komercaj kontaktoj por postaj komunaj aranĝoj. Ĝi ebligas komparojn kaj fierajn memprezentojn, tiel allogante novajn klientojn. Al instrumentistoj la foiro permesas provludojn de la 30 000 muzikinstrumentoj kaj rektajn aĉetojn, same mendojn; al profesiaj muzikistoj kaj

amatoroj unuafojan renkontiĝon kun novaj muzikaĵoj, eldonaĵoj kaj produktaĵoj. Foje firmaoj aŭ regionoj vidigas surloke la altan staton de siaj ofte treege specialigitaj metiistoj.

Fakaj prelegoj

Dum la ekspoziciaj tagoj okazis 700 akustikaj prezentaĵoj en la standegoj kaj budoj mem kaj 300 altkvalitaj koncertoj el ĉiuj ĝenroj en diversaj salonoj, tendoj kaj haloj. Proponiĝis abunde fakaj prelegoj pri la muzikrilataj merkato, pedago-

gio, sociologio, politiko, kulturo, ktp.

Nelaste diversaj organizaĵoj disdonis premiojn kiel la prestiĝajn „Frankfurta muzikpremio”, „Pianisto de la jaro”, „Germana muzikinstrumenta premio”, „Plej bela muzikeldonaĵo de la jaro”, kaj plurajn aliajn. Eĉ sen aĉeto la foiro tiel fariĝas festo por la vizitantoj pro la preskaŭ kompleta prezentiĝo de la monda muziko en unu loka kaj tempa tuto.

Al la publiko ankaŭ venontjare post la pli trankvilaj komercaj horoj la muzikfoiro malfermos siajn pordojn dum la lasta tago por bunta aŭd-vida spektaklo. La enirprezo entenas aliron al koncertoj kaj bus-transporton el urboranda parkumejo al la urbocentra ekspoziciejo. Aŭtoŝildoj el preskaŭ la tuta Eŭropo indikas, ke valoras tiu ĉi tuttaga frankfurta trempiĝo en la mondon de muziko.

Franz-Georg RÖSSLER



Parto 3:

Apple iPad - ĉu revolucio aŭ evolucio?

En la fino de januaro Steve Jobs [stiv ĝobz], la fama gvidanto de la firmao Apple, prezentis novan tabuloforman komputilon, *iPad*. Tio ne estas la unua fojo en la historio de komputiloj, ke iu aperigas tian tabulecan aparaton, taksante ĝin revolucia. Ĉu ĝi iĝos tiel populara kiel portebaj MP3-muzikludiloj, kies merkaton Apple mem kvazaŭ regas per siaj *iPod*-produktoj? Aŭ ĉu ĝi fiaskos kiel antaŭaj provoj tra la jaroj, de *Apple Newton* en la naŭdekaj jaroj, tra diversaj variaĵoj de tabuloformaj komputiloj bazitaj sur la sama teknologio kiel tekokomputiloj, kaj la etekranaj aparatoj por spekti filmojn kaj aŭskulti muzikon, tiel nomataj aŭdvidaj ludiloj?

Tabula komputilo

La aparato mem uzas ne revolucion, sed nuntempan teknologion, sed

en iom nova kaj alloga kombinaĵo. Ĝi havas 24-centimetran ekranon similgrandan kiel magazino, en deca formato kun deca kvanto da bilderoj (1024 oble 768). La interreta aliro estas per sendrata reto (802.11, Wi-Fi), aŭ opcie per la poŝtelefona sistemo 3G, kaj, plej grave, ĝi havas akumulatoron kun kapacito sufiĉa por tuta tago, tiel ke sufiĉas ĉiunokte remeti la tabulon en ĝian ŝargodokon. Tio estas grava afero, ĉar ĝis antaŭ nelonge tipaj tekokomputiloj, kaj tabulaj komputiloj uzantaj ties teknologion, havis akumulatorojn, kiuj tipe daŭras nur du ĝis kvar horojn, kio necesigas tro ofte rekonekti al elektro – ne tre praktike por enmana aparato. Sufiĉa akumulatoro estas nepraĵo por la koncepto „tabula komputilo”. *iPad* ankaŭ komforte pezas ĉirkaŭ 700 gramojn.

Elektrouzon oni tamen ne ŝparis per

la ekranon. Du nuntempaj teknologioj senchavas por tia aparato: unue, klasikaj plataj likvakristalaj ekranoj, kiel tiuj uzataj en tekokomputiloj kaj por surtablaj plataj ekranoj; aŭ due, elektronika inko de la speco uzata en legiloj por elektronikaj libroj, kiu bezonas elektron nur por ŝanĝi la bildon, do estas tre ŝparema, sed nuntempe funkcias nur nigrablanke kaj povas nur malrapide ŝanĝi la bildon, bezonante tipe unu aŭ du sekundojn. Tiu dua speco ne konvenas por rapide ŝanĝiĝanta enhavo kaj la moviĝantaj bildoj de televido aŭ filmo. Ĉar *iPad* ambicias esti pli ol tekstolegilo, ĝi havas klasikan koloran ekranon, kiu taŭgas same por bildoj, filmoj kaj por tekstoj kaj retpaĝoj.

Kaj, kompreneble, la ekranon uzas kapacitan tuŝekranon, kiu estas tre sentema kaj ebligas la uzon de pluraj fingroj



„iPad” havas multajn eblajn uzojn. Sed kiuj populariĝos?

samtempe, malkiel la pli fruaj rezistaj tuŝekranoj.

Regado per tuŝo

La tuŝekrano estas grava, kaj evidenta, ĉar la tuta uzantosperto estas bazita sur interagado per fingroj, ne per muso kiel ĉe tekokomputilo. Pro tio *Apple* kreis la mastruman sistemon kaj programaron por *iPad* el la poŝtelefona platformo de *iPhone* kaj ne el la tradicia komputila mastruma sistemo *MacOS* de siaj surtablaj kaj teko-komputiloj. Estas oportune, ke en la pasintaj jaroj *Apple* sukcesis allogi programistojn al la *iPhone*-sistemo, do ekzistas nun impona aro da programoj konceptitaj por enmana aparato regata per la fingroj. Ne ĉiuj perfekte taŭgos kun pli granda ekrano ol telefono, sed tiam ili povos ruliĝi ene de fenestro, kaj la tasko adapti programon al diversaj ekrangrandoj ne estas tiel malfacila, kiel la tasko konverti musregatan programon al fingroregata. Tio estas eble la plej alloga aspekto de *iPad*: la mastruma sistemo kaj programoj havas uzantinterfacon taŭgan por enmana uzo. Antaŭaj tabulaj komputiloj ofte provis adapti musoregatajn mastruman sistemon kaj programaron al la tabulo, kio ofte donis rezulton apenaŭ uzeblan.

La ĉefa funkcio de *iPad* estas kiel alirilo al la reto, tutmonda aŭ endoma, ĉu por retpaĝoj, televido, por spekti filmojn, aŭ por legi librojn kaj gazetojn. Ĝi estas iaspeca konkretigo de retumilo, sed transportebla al la sofo aŭ en la liton. Kompreneble ĝi kapablas ankaŭ ludi muzikon kiel *iPod*, aŭ ludi ludojn. Ĝi ŝajnas pli taŭga por privata uzado ol en la oficejo, kie tablaj aŭ teko-komputiloj pli taŭgas. Por uzantoj sen komplikaj bezonoj ĝi eble povus iĝi la ĉefa komputilrimedo.

Furoro en blogujo

Kun la forta personeco de sia estro, la forte rekonebla kaj kvalita aspekto de siaj produktoj kaj la historio de la firmao, per ĉiu nova anonco *Apple* provokas multajn diskutojn en la reta „Blogujo” kaj pli ĝenerale en la gazetaro. Cetere,



Steve Jobs prezentis la novan tabulan komputilon „iPad” ĉe speciala evento en San-Francisko en januaro.

iPad havas apartaĵojn, kiuj provokis pliajn disputojn.

Ekzemple, ĝi ne ebligas, ke pli ol unu fremda programo ruliĝu samtempe sur la maŝino mem, kaj ĝi ne kapablas ruli la ofte uzatan enretumilan programon *Flash* de la firmao *Adobe*, kiu ebligas interalie la moviĝantajn reklamojn ofte vidatajn ene de retpaĝoj. Tiel estas same kiel ĉe *iPhone*.

Fakte ne malfacilus por *Apple* proponi ambaŭ kapablojn, sed ĝi argumentas, ke ili kreus malstabilecon, kiu malbonus por la uzantosperto – ne senprave, ĉar la programo *Flash* fifamas pro oftaj kolapsoj. Ankaŭ plurtaskado estus malfacila sen aldona risko, ke iu programo malstabiligus la tutan aparaton, aparte ĉe tia aparato malpli potenca ol kutima komputilo; kaj tiu kapablo ne tiom gravas por retumilo, kies ĉefajn funkciojn pritraktas la mastruma sistemo.

Pli ĝenerale, komentistoj disputas inter si, ĉu *iPad* vere utilas, ĉu ĝi tro kostas, ĉu ĝi faras ion novan, kaj ĉu ĝi estas granda revolucio en la historio de komputiloj. Ja malferma demando estas, ĉu la aparato trovos sian lokon inter aliaj disponataj aparatoj: unuflanke estas lertaj poŝtelefonoj, kiuj ebligas pli-malpli

samajn funkciojn, sed kun konsiderinde pli eta ekrano, por multaj uzoj ne tiom konvena; aŭ ĉe la alia flanko estas teko-komputiloj, kies plej etaj kuzoj, „teko-komputiletoj”, havas similajn aparatajn kapablojn, sed kun klasika interago per klavaro kaj muso. Flanke sidas legiloj por e-libroj, kiuj havas nur unu funkciojn, sed kun propra avantaĝo de portebeco kaj daŭro de akumulatoro.

Tabula retumilo eble ne ŝanĝos la mondon, sed se ĝi sukcesos, estos en la domo plia uzado de komputilo for de la skribotablo, ne nur anstataŭ klasikaj komputiloj, sed ankaŭ anstataŭ televido aŭ papero. Kaj se ĝi ja sukcesos, estos ankaŭ ŝanco por konkurantoj. Jam anonciĝis similaj tabulaj komputiloj, kiel *JooJoo* de la firmao *Fusion Garage* kaj *Adam* de *Notion Ink*. Ili havas similan aparataron kaj estas simile bazitaj sur fingroregata poŝtelefona mastruma sistemo, kelkfoje *Android* (adaptita *Linux*) de la firmao *Google*.

La estonteco montros, ĉu ĉi tiu nova kategorio de aparatoj furoros, kaj ĉu, kiel ĉe muzikludiloj, la produkto de *Apple* difinos ĝin.

Franck ARNAUD

Elektronikaj libroj en iPad

Per la integrita programo *iBooks* eblas legi librojn en la formo ePub, inkluzive de esperantaj libroj vendataj de FEL. Ŝajnas fakte, ke la programo *iBooks* komprenas nur ePub. Por legi libron (aŭ la magazinon *MONATO*) en PDF-formo necesas instali kroman programon, ekzemple la malmultekostan aplikadon *GoodReader*. Ekzistas ankaŭ aliaj programoj por legi ePub-librojn en *iPad*, ekzemple *Ibisreader* kaj *Stanza*. La kreintoj de la programo *Stanza* tamen jam anoncis, ke ĝi ne estos pludisvolvata por *iPad* – supozeble ĉar *Apple* aĉetis ĝian fontokodon por la propra programo *iBooks*.

FRANCIO

La ekologiaj nutraĵoj de AMAP


Dum la sesdekaj jaroj en Japanio patrinoj timis pri la efikoj de altrendimenta kultivado kaj malsanigaj manĝaĵoj por la infanoj. Ili kontaktis unu agrokulturiston kaj aĉetis lian sanan produktaĵon, antaŭ ol li produktis ĝin. Tiel ekestis *Teikei* (meti la vizaĝon de kamparano sur manĝaĵon); ĝi estis la praulo de la franca AMAP (*Aide au Maintien d'une Agriculture Paysanne*, „Asocio por helpo al konservado de kamparana agrikulturo”). De 2001 ekzistas AMAP-asocio en suda Francio, apud Tulono (danke al la familio Vuillon); nur en Provenco estas nun 120 „AMAP’oj” kun pli ol 20 000 profitantaj familioj.

Kiel funkcias?

Unu AMAP naskiĝas pro la renkontiĝo inter grupo de konsuman-

toj kaj unu agrokulturisto. La partoprenantoj serĉas sanan manĝaĵon, tiun, kiu kreskas respektante homon kaj naturon. Pro tio ili anticipas aĉetas la produkton de agrokulturisto. Povas esti fruktoj, legomoj, ovoj, viandaĵo. Konsumanto kaj produktanto kontraktas por unu aŭ du sezonoj (printempo/somero, aŭ aŭtuno/vintro). Interŝanĝe la produktisto sin devigas kreskigi siajn legomojn kaj fruktojn sen kemiaĵo, ekologie, kaj prepari semajne (unufoje aŭ pli, dependas de la grandeco de la kampoj) unu korbon por ĉiuj AMAP-anoj. La enhavo de la korbo dependas de la rikolto, sed ĝi devas nutri kvar personojn dum unu semajno. Principe la tuta produktaĵo estas konsumata, senkonsidere de laŭnorma aŭ nelaŭnorma aspekto.

La distribuado okazas ĉe la agrokul-



turisto mem aŭ en proksima loko. La prezo de la korbo similas la prezon en superbazaro kaj monproblemo ne malebligas partoprenon (ekzistas diversaj ebloj por pagi).

Kiuj estas la bonaĵoj?

Ĉar agrokulturistoj havas garantiatan enspezon kaj plibonigitan statuson, ili ne plu ŝatas volonte vendi siajn kampojn al kultivejoj aŭ konstruigistoj. Pro tio AMAP malrapidigas la malaperon de kultivkampoj kaj produktistoj.

Ĉar produktanto kaj konsumanto dividas inter si la riskon, ambaŭ pli bone konservas noción pri sezonoj.

Ĉar la produktokampo estas proksima, la manĝaĵoj estas freŝaj kaj plej sanaj; ne necesas multe da transporto, do okazas malpli da poluo.

Ĉar la agrokulturisto ne uzas kemiaĵojn, kultivejoj iĝas pli fekundaj, manĝaĵoj estas bonkvalitaj.

Ĉar AMAP estas renkontiĝejo, ĝi rekreas homajn ligojn, ĝi rekonectas urbojn kaj kamparanojn.

Nun estas AMAP-asocioj tra la mondo, en Japanio *Teikei*, en Usono *CSA* (*Community Supported Agriculture*), en Kanado „Farmisto de la Familio”, Svisio *ACP* (*Agriculture Contractuelle de Proximité*). Eble jam ekzistas unu proksime de vi, se ne, nenio malebligas krei ĝin.

Marie-Ho



La distribuado okazas ĉe la agrokulturisto mem aŭ en proksima loko.

Propraj nomoj

Simpla kaj utila broŝureto dulingva: esperanta teksto sur la maldekstraj paĝoj, franca teksto sur la dekstraj paĝoj. Cherpillod klare kaj sisteme prezentas la kvar plej kutimajn metodojn solvi la problemon pri transskribo en Esperanto de propra nomo:

1. Lasi ĝin tute senŝanĝa.
2. Transskribi ĝin laŭ ĝia proksimuma prononco.
3. Traduki ĝin.
4. Iel ajn esperantigi ĝin.

Cherpillod zorge studis la tekstojn de Zamenhof, inkluzive de liaj privataj leteroj, kaj trovis liajn kutimojn (konsekvence, rekomendendajn) pri diversaj specoj de propraj nomoj.

... Zamenhof respektis la principojn: esperantigi proprajn nomojn, nur kiam ili havas internacie similan ortografion, aŭ lasi ilin en ilia origina nacilingva ortografio.

Cherpillod konstatis, ke:

Rilate al personaj nomoj: Kiam temas pri realaj nuntempaj personoj, Zamenhof respektis la originan nomon, ekzemple Alfred Michaux, Gabriel Chavet ktp.

Kiam temas pri historiaj aŭ fikciaj personoj, Zamenhof ofte esperantigis ilin: Polonio, Adamo, Vilhelmo ktp. Sed li ankaŭ tre ofte lasis ilin en la origina formo: Hans, Marcello, Hjalmar, Thomas ktp.

Kiam temas pri virinaj nomoj, Zamenhof kelkfoje donis al ili *o-finaĵon*:

Anneto, Doroteo, Klaro;

kelkfoje uzis por ili la finaĵon *-ino*: Gustavino, Johanino, Kristino;

kelkfoje uzis por ili la finaĵon *-a*: Marta, Gerda, Helga;

kelkfoje lasis ilin en la *origina formo*: Else, Inger, Molly ktp. Sekve, neniu ĝeneralan regulon pri virinaj nomoj li uzis.

Rilate al familiaj nomoj: Kun du iom strangaj esceptoj, Zamenhof ĉiam lasis ilin en la origina formo: Boirac, Jespersen, Saussure kaj aliaj. La du esceptoj estas en la Ekzercaro en la Fundamento, kie troviĝas ankaŭ *Sillero* kaj *Vaŝington* [*verŝajne V anstataŭ W por faciligi la prononcon?*].

Kiam temas pri loknomoj: li aŭ esperantigis ilin laŭ internacia formo, aŭ lasis ilin nacilingvaj.

Kion emfazas Cherpillod, estas, ke Zamenhof respektis la principojn: esperantigi proprajn nomojn, nur kiam ili havas internacie similan ortografion, aŭ lasi ilin en ilia origina nacilingva ortografio.

Cherpillod-on tre ĝenas, ke iuj propraj nomoj, tamen, ofte ricevas nepravigeblan formon en la Esperanto-uzado nuntempe. La plej frapa ekzemplo estas la nun jam tre populara landonomo „Barato”, kies internacia formo estas ekskluzive esperantigebla kiel „Hindio”. Mi konsentas kun li pri tio. Laŭ li kaj mi, „Barato” ne pravigeblas.

Ensume, Cherpillod pledas, ke ni reiru al la sistemo uzita de Zamenhof, kaj ĉesu inventi novajn arbitrajn „regulojn”. Miaopinie, li pravas.

Donald BROADRIBB

André Cherpillod: *La propraj nomoj/Les noms propres*. Eld. la aŭtoro, Courgenard, 2010. 36 paĝoj vinktitaj. ISBN ne indikita.

Prezo ĉe FEL: 4 eŭroj + afranko



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Bonvena ekpaŝo

Ĉu „kajero” povas enhavi 213 paĝojn? Ĉu tia ne estus la kajo mem? Jen la unua numero de *Homarane*, kajero-revuo, kiu aspiras ampleksi artikolojn pri „homaranismo, homaranistiko [ĉu?], zamenhofologio, sociologio, historio, aparte idehistorio, religiscienco ktp.” Imagu la „ktp”. Ĉi tiu, la unua numero enhavas artikolojn, rezultintajn el simpozio pri homaranismo ĉe KCE, La Chaux-de-Fonds („Ĉaŭdefono” laŭ iuj) dum aŭgusto 2009.

Inter la kontribuintoj troviĝas Francisko Degoul, Carlo Minnaja, Christer Kiselman, Perla Martinelli, Giorgio Silber, Walter Ŝelazny, Zofia Banet-Fornalowa, Armando Zecchin, Henri Masson, André Cherpillod: nu, bona starto. Duono de la artikoloj vere temas pri homaranismo, la ceteraj pri pli-malpli rilataj temoj. Oni bonege priskribas la evoluon de homaranismo (Degoul, Ŝelazny, Banet-Fornalowa, Cherpillod) kaj plurflanke la kuntekstojn socian, historian, intelektan de homaranismo (kaj, cetere, de Esperanto), sed preskaŭ tute mankas serioza, kritika aprezo pri homaranismo kiel idearo. (Ĉu homaranismo estas religio, etiko, filozofio, ideologio? – jen unu el la kernaj demandoj.)

La plej ampleksa kontribuado estas tiu de Kiselman, kiu plej klare kaj senpartie resumas la temon; kaj la plej originala tiu de Ŝelazny, kiu spertule rigardas homaranismon en ties historia kaj socia kunteksto. Por mi aparte interesa estis ties rilatigo de homaranismo al la perspektivo de Zamenhof pri judismo, cionismo kaj la jida lingvo. La artikolo de Martinelli pri Edmond Privat kaj la palestina demando ankaŭ tre tenis la atenton, plej eble ĉar pri tiuj detaloj mi antaŭe ne legis. Ne necesas diri, mi supozas, ke la peco de Cherpillod, pri

Hilelo, estas faktoplena kaj aŭtoritata. (Ĉu mi ne jam legis la plimulton, tamen, en ties samtema broŝuro de antaŭ kelkaj jaroj?)

La ĉefa malforto de la „kajero”, laŭ mia takso, estas, ke ĝi diskutas homaranismon – sufiĉe detale – sen allaso, ke tiu idearo estas nur la zamenhofa renasko de plej antikva pensofadeno, nome la (religia) universalismo. Jam de jarcentoj fakuloj konstatas, ke troveblas

Oni bonege priskribas la evoluon de homaranismo kaj plurflanke la kuntekstojn socian, historian, intelektan de homaranismo (kaj, cetere, de Esperanto), sed preskaŭ tute mankas serioza, kritika aprezo pri homaranismo kiel idearo.

en la religioj kaj kredsistemoj de la mondo – tra jarmiloj – konstantaj elementoj, kiuj reprezentas la komunan saĝon de nia specio – la „homaro”. Tiuj ideoj kosmologiaj kaj moralaj facile vidiĝas en kristanismo, islamo, budhismo, hinduismo, daŭismo kaj centoj da aliaj tradicioj grandaj kaj pli lokaj; ankaŭ en socialismo kaj humanismo. Ĝis sia morto Zamenhof sukcesis nur skize evoluigi siajn ideojn, kiuj troveblas en pli evoluinta formo aliloke, ekzemple, la verko de Julian Huxley el la 1940-aj jaroj, *The Perennial Philosophy* (La eterna filozofio).

Homaranismo gravas por ni, ĉar ĝi estas la pliampleksigo de la „interna ideo” de Esperanto, sed ni ne trompu nin, supozante, ke Zamenhof estis fakulo pri filozofio, des malpli pri teologio.

Tiurilate, en la kajero, Armando Zecchin grave maltrafas, kritikante homaranismon kvazaŭ ĝi estus teologio, rivala al la dogmoj de lia amata Vatikano. Tute ne: Zamenhof estis plej bonkora idealisto, neniom teologo.

Mi esperas, ke aperos pluaj numeroj de *Homarane* kaj ke oni pli efike projektos ĝin. Ĝi sendube pli sukcesus, se ĝi estus malpli ol 100-paĝa (kaj kostus malpli ol €10); por atingi tion necesus pli rigore selekti artikolojn kaj pli severe redakti/redukti la akceptatajn. Ankaŭ helpus, se malpli evidentus la ombra mano de la Konsulo! Amuzis min, ke kvankam la civita papo samaĝas kun mi, lia „biogramo” nepre devas esti duoble pli longa ol la aliaj. Kaj ĉu vi kredus, ke tiu eksterordinarulo kapablas interpunkcii sian paroladon per punktokomoj? – vidu la „sindezojn” de la diskutoj, kiuj sekvis kelkajn sed ne ĉiujn kontribuadojn. (Ne surprizos, tamen, ke la konsulaj kontribuoj estas ĉiam la plej longaj.) La eldonaĵo, malgraŭ tiuj miaj grumbletoj, estas bone redaktita: mankas preseraroj kaj la kvanto da neologismoj estas (por mi) bone akceptebla (editoralo, biogramo, preamblo ...?).

Nu, bonan sukceson al *Homarane* – kaj cetere al la kongreso pri homaranismo, kiun oni projektas por 2014. La fenomeno Esperanto ja ne estas nur lingvo, sed pro variaj kialoj ni jam longe neglektas la filozofian, ideologian, sociologian aspektojn de „nia afero”. Mi rekomendas la kajeron, precipe al bibliotekoj kaj esperantologoj.

David KESLO

Homarane – kajero en Esperanto pri socio, filozofio, religio. Eld. LF-koop, La Chaux-de-Fonds, 2010. 213 p. gluĵitaj. ISSN 1663-8484.

Litera sudoku

La reguloj de ĉi tiu speco de sudoku estas la samaj kiel por la cifera sudoku, nur ke la ciferoj 1 ĝis 9 estas 9 diversaj literoj kaj ke sur la unua horizontala linio griza la litera sinsekvo formas (radik)vorton (aŭ nombron litere skribitan).



MARRY MUSES

Sendu la vortojn antaŭ la 1a de aŭgusto al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

A			T	N	Ŭ			
	Ŭ			I		T	E	D
	E	K	A		I	Ŭ		N
				K			R	
		T	Ŭ			K		A
N	I			A	D		Ŭ	
E		D	I			A		K
	K	A	E		N			R

Solvo de la litera sudoku (Monato 1/2010)

Ĵ	U	R	N	A	L	I	S	T
S	A	I	T	R	Ĵ	L	U	N
L	T	N	S	U	I	Ĵ	A	R
R	S	L	Ĵ	T	U	A	N	I
T	Ĵ	U	A	I	N	R	L	S
I	N	A	L	S	R	T	Ĵ	U
N	I	Ĵ	U	L	T	S	R	A
U	R	S	I	Ĵ	A	N	T	L
A	L	T	R	N	S	U	I	Ĵ

Evidentiĝis ke tiu ĉi litera sudoku estas facila ĉar multe da reagoj (retaj) alvenis ĉe ni. Tamen nur tri personoj ĝojis premion nome:

Aune Makkonen (Finnlando), Joan Clos Rigual (Hispanio) kaj Bertilla Vidale (Italio). Gratulojn!

Solvo de la bilda enigmo (Monato 4/2009)

A	V	E	N	T	U	R	O
L	E	T	E	R		E	K
K	L	A	S			B	U
O	O		T		L	U	L
H		S	O	L	I	S	T
O	K		R	A	T		A
L	U	P		N		A	S
O	K	S	I	G	E	N	

Multe da reagoj alvenis ĝoje bedaŭrinde!

Bedaŭrinde ĉar estas temporaba projekto sed ĝoje pro viaj reagoj. La trovenda vorto estis laŭsinsekve ESKAPI. Same bedaŭrinde ke nur tri homoj povos ĝoji premion, nome Carlo Minnaja (Italio), Sung Ho Cho (Koreio) kaj E. Williger (Usono).

Soneto

Neniu vere vivas en libero.
En iu senco, ĉiu estas sklavo
de malriĉec', malvirto aŭ malvero,
de ŝajna bono (en reale mavo),
de hipokrito aŭ de hipotezoj
nek konfirmitaj, nek iam proveblaj,
senvaloraĵo je merkataj prezoj;
ĝis kiam eble en la menson venos
konscio pri la trista stato nia:
ke vi kaj mi langvoras en katenoj
forĝitaj pli per hom' ol per destino:
malbeno kaj persona, kaj socia;
kaj ni scivolas ĉu eĉ am' aŭ saĝo
malfermos la kradpordon de la kaĝo.

Garvan MAKAJ

© Lode Van de Velde

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei libroliston laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



LA GRAFO DE MONTE- KRISTO

**La vivoverko de
Alexandre Dumas kaj
la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand**

Oni kutimas konsideri la libron *La Grafo de Monte-Kristo* kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re)legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li konatiĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian juncon, lian feliĉon.

A. DUMAS



**LA GRAFO DE
MONTE-
KRISTO**

FEL

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio (en 2 volumoj): formato 135 x 210 mm, pezo 1333 g, 1184 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-43-0; prezo ĉe FEL: 96 EUR (inkluzive de registrita afranko).

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 32 EUR